

NOVA EŬROPO

INTERNACIA TRIBUNO DE MALGRANDAJ NACIOJ.

ABONPAGO en Ĉeĥoslovakio por 10 numeroj de »Nova Eŭropo« kun »Ĉeĥoslovaka Gazeto« 10 Kč
Prezo de unu numero 1 Kč
Pri ceteraj landoj vidu inter anoncoj.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
EN PRAHA II., TĚŠNOV N° 10. (Ĉeĥoslovakio).
Posedanto, eldonanto kaj responda redaktoro Oldřich Adámek.
Presejo »Politika« en Praha.

APERAS MONATE.
La manuskriptojn oni ne resendas.
Poŝtĉeko ĉeĥosl. N° 11.038.
Vidu prezojn de la anoncoj sur anonca pago.

Internacia vivo. — Interesoj de malgrandaj nacioj. — Ĉeĥoslovakaj aferoj. Esperantista mondo.

N° 2.

Praha, 30 julio 1921.

I. Jaro.

La kultura signifo de malgrandaj nacioj.

Antaŭ la tutmonda milito estis tre divastigita kvazaŭ scienca opi io pri la kultura malsupereco de malgrandaj, precipe tiel nomataj — nehistoriaj nacioj.

Laŭ ĉi-tiu opinio malgrandaj nacioj kaj ŝtatoj per la kultura progreso kaj evoluo de la homaro estas certe kondamnitaj je iompostiomia, sed neevitebla malapero, ĉar la tuta mondo evoluas al ĝenerala centralizacio, tio estas, al formiĝo de grandegaj ŝtatoj kaj samtempe al perforta aŭ normala asimilacio de malgrandaj nacioj, precipe senigitaj de politika kaj ŝtata sendependeco.

Tiu pli, politika ol scienca, teorio estis rilatigata ĉefe al »nehistoriaj« kaj precipe al neariaj nacioj de Meza kaj Orienta Eŭropo (Finoj, Estonoj, Armenoj, Gruzinoj ktp).

Ankoraŭ dum la milito la germana konata scienculo P. Rohrbach penis pravi, ke ekzemple la baltaj naci j — Estonoj kaj Letonoj — ne estas kapablaj la memstaran plenan kulturalan evoluon, ke ilia literatura lingvo ne sufiĉas por altaj bezonoj de vera tutmonda kulturo. Simile antaŭ la milito oni povis legi en rusaj aŭ polaj ĵurnaloj aŭ verkoj pri la memkomprenebla kultura malsupereco de Ukrainoj kaj Litovoj kun samtempaj deduktoj, ke estas necese en la intereso de tuta homaro kaj progreso rusigadi aŭ poligadi ilin.

Siatempo svedaj kontraŭuloj de la finna nacia renaskiĝo jesadis, ke tiu-ĉi ugro-finna gento ne

Olga Kobylanska.

En moderna ukraina literaturo tre signifoplenan taskon havis kaj havas virinoj, ekzemple tre eminenta novelistino Marko Vovĉok (Markovyĉova), kiun genia ukraina poeto Taras Ŝevĉenko nomis »mia nepino« kaj kiu havis grandegan influon, kiel verkistino, je liberigo de kampistoj el servutjugo (ŝi vere estis ukraina Becher Stove) aŭ fama poetino Lesia Ukrainka († 1913), kiu estis unu el plej maloftaj aperoj en ukraina ĝisnuna poezio. Al tiu vico de ukrainaj verkistinoj apartenas ankaŭ Olga Kobylanska, tre originala beletristino el ukraina Bukovinio, kies kreado estas karakterizita per forta arteco, siaspeca literatura stilo, profunda psikologa analizo de homa individuco kaj varmega amo al naturbeleco, gepatra tero kaj propra popolo, precipe kampara. Tiurilate fama estas ŝia rimarkinda verketo »La tero« (Zemlja) kiu profunde kaj arte pentras grandan kamparan epopeon de l'ukraina popolo, la reciprokan rilaton inter ukraina kamparisto kaj tero. Ukraina literatura kritiko komparas ĉi-tiun novelon kun la konata romano de Zola — »La tero«. Ĉi-tiun problemon el diversaj flankoj ŝi priskribadis en multaj siaj verkoj, precipe en siaj romanoj de lasta tempo.

El aliaj ŝiaj unuaj verketoj estas rimarkindaj jenaj noveloj: »La naturo«, »Malkleruloj«, precipe belega »Valse melanicholique«, »Sub nuda ĉielo« k. t. p.

estas kapabla kulture eŭropiĝi sur la propra nacia bazo. Per samaj manieroj Germanoj en Bohemio kontraŭbataladis aŭ mokis la kulturajn penadojn de unuaj ploniroj kaj »vekantoj« de ĉeĥa nacia reviviĝo.

Unuvorte, preskaŭ ĉiu nacio renaskiĝinta en nova epoko — precipe malgranda — devis defendi sin kontraŭe riproĉoj pri ĝia kultura malkapablo. Tiuj rasaj kaj naciaj teorioj efektive kaj science estas senbazaj, egaltempe do senvaloraj. Laŭvere ili baziĝis sur la imperialistaj tendencoj de regantaj nacioj, kiuj tiumaniere volis pravigi aŭ senkulpigi sian agresivan politikon kontraŭ nacioj kaj landoj dependantaj kaj sklavigataj de ili.

Vera scienco delonge jam decide kondamnis tiajn kvazaŭ sciencajn teoriojn pri la rasa aŭ kultura malsupereco de malgrandaj aŭ neariaj nacioj. Laŭ ĝi certa malfruiĝo en la kultura progreso kaj evoluo de iuj nacioj estis kaŭzita ne de ilia kultura nekapablo, sed de neavoraj historiaj kondiĉoj, geografia situacio, ofte ĝi dependis ankaŭ de iliaj ĝisnunaj ekonomiaj kaj sociaj rilatoj. Ne ekzistas efektive iuj pli- kaj malpli superaj rasoj aŭ nacioj, Ekzistas sole pli aŭ malpli evoluintaj, pli aŭ malpli feliĉaj gentoj en ilia historia vivo. Tiel same ne ekzistas unuflanke elektitaj kaj noblaj nacioj aŭ rasoj, kaj aliflanke, forĵetitaj, malnoblaj kaj do kondamnitaj je nacia kaj kultura morto.

La universa kaj tutmonda apero de ĝenerala renesanco de diversaj mezeŭropaj kaj orienteŭropaj nacioj, precipe malgrandaj slavaj gentoj,

El ŝia novelaro — »Al lumo« — (1905) ni publikigas fragmenton »Akordoj«, kiu konatigos al la legantoj tiun ĉi eminentan kaj originalan ukrainan verkistinojn, kiu prave estas konsiderata en Ukrainio kiel unu el la plej belegaj ornamaĵoj de ukraina nuntempa literaturo.

Olga Kobylanska:

Akordoj.

Malproksimege kaj altege, kie estas klaraj steloj, tie verŝajne estas mia feliĉo. El tie devenas sopiro en mi, kiun dlo metis en mian koron kaj neniu povas ĝin trankviligi.

Mi atendas anĝelon de l'morto. Mi sentas ĝin jen kaj jen... kiel ĝi iras kaj aperadas tuj jen tuj tie... mi baldaŭ ekaŭdos, kiel ĝi preteriros mian pardon! Tie verŝajne estas mia feliĉo!

Mi eniris arbaron. Ĉirkaŭe estis tiel silente. Ĉi-tie silento kaj malvarmo estas tiel grandaj, ke mi ilin eĉ timas. Mi volas per varmaj vortoj ekvivigi ilin kaj min, mi diras tiujn vortojn.

Sed ili restadas sen eŝo. Tiel silente kaj dezerte kiel antaŭe... tiel morde en la trokreska floro, ke malĝojon ekposedas min. Mi denove laŭte vokas el la plena brusto plej varmegan vorton, kia nur ekzistas en la mondo... kaj ĉu vere? post longa paŭzo iras eŝo, paŝo post paŝo kvazaŭ el malvarma abismo eliradus ĝoja vojaĝisto: »Mi amas Cin!« eksonadis la eŝo tra arbaro kaj longe ankoraŭ ĝi vivis en me-

plue ugrofinnaj aŭ baltaj kaj en lasta tempo ankaŭ ekstereŭropaj (Hindoj) neariaj rasoj (Usonoj Negroj) — povas pravi opinion esprimitan supre.

Konata magiara orientisto Vambery konstatis en sia verko pri la kulturo de turanaj gentoj, ke primitiveco de tiuj ĉi estis kaŭzita en per gentaj faktoroj, sed sole »per ilia politika, socia kaj iom geografia situacio.« Eminentaj germana naturesploristo. A. Humboldt en sia fama verko »Kosmos« ankaŭ kaj decide esprimis kontraŭ la teorio pri la kultura malsupereco de iuj nacioj aŭ rasoj, prave konstatante, ke ĉiuj gentoj egale kaj same estas destinitaj al la libero kaj progreso. Viena filozofo Jodl trafte certigis, ke neniu nacio aŭ raso havas ian monopolon je la kulturo, arto kaj progreso ĝenerale, sed ĉiu laŭ sia ebleco kaj kapableco kunlaboras je la tutmonda kaj homara perfektigado.

La historio mem korektas fakte la senbazecon de la teorio pri la malaperado aŭ kultura malsupereco de malgrandaj nacioj kaj ŝtatoj.

Tiurilate la nuna ĉeĥoslovaka prezidanto T. G. Masaryk skribis en sia artikolo: »La problemo de malgrandaj nacioj kaj la milito (en 1917 j.): — »La historio do ne pruvas, ke malgrandaj nacioj kaj ŝtatoj malaperadas; kontraŭe ĝi pruvas tute klare, ke malgrandaj nacioj memstariĝas.« En sia konata monografio — »Nova Eŭropo« — li interalie konstatis: »Historio instruas, ke la evoluo decide favorigas la naskiĝadon de malgrandaj kaj plimalgrandaj naciaj ŝtatoj.« Laŭ T. G.

moro de ĉiuj floroj, kvankam ĝi mem delonge pereis.

Ĉiu homo unufoje dum la vivo haltas kaj ne scias, kien li devas turniĝi. Mi scias mian vojon. Ĝi estas soleco. Ĝi fiksas siajn terurajn, malvarmajn okulojn je mi kaj okulsignas al mi.

Mi iras.
Mi devas servi al ci, Ci-granda senkora soleco kaj mi metos ĉe tiuj pledoj miajn kantojn. Ekridetu tiam!

Ĉi-tiu rideto estas tiel dezira, tiel bona... tiel dolĉa por lacigita koro, ke ĝi vane petegis tion ĉe homoj

De mi al Ci — etendiĝas klara vojo.
Kiel arĝenta rubandeto.
Tra ĝi per malpezetaj paŝoj iras la revoj de mia koro.

Lastaj revoj de mia junuleco. Mallevente malĝojajn kapetojn, ili ĉirkaŭrigardas kaj adiaŭas: »Ni neniam jam revenos... fiera vivo!... ni jam ne revenos... ni estas lastaj... lasu al ni almenaŭ ĝisvivi tiujn tagojn.« Kaj ili silente paŝas per silenta vojo al ĝi, por ke ili tie forvelku.

(El ukraina lingvo tradukis H. a. b.)

Grand-hotel „CENTRAL“
PLZEŇ, Placo de la Respubliko, Ĉeĥoslovakio.

Masaryk estas ankaŭ senbaze riproĉi al la malgrandaj nacioj kulturen malsuperecon. Ĝenerale laŭ li la grandeco aŭ nombro ne povas esti mezurilo de la kultura signifo aŭ kapableco de nacioj; aliflanke la koncepto mem de la nacia grandeco aŭ malgrandeco estas tre relativa.

»Malgranda nacio — diras Masaryk en »Nova Eŭropo« — povas fari intense sian laboron kaj tiamaniere kompensi ĝis la certa grado sian malgrandecon; granda nacio agas en ĉiu sia farado pli ekstense. Tiu ĉi rilato estas simila al tiu inter la posedanto de malgranda terpeco kaj de granda bieno.«

T. G. Masaryk deduktas el tiuj konsideroj (en sia pli supre citita artikolo pri la malgrandaj nacioj) — ke »la nacia individueco de malgrandaj nacioj devas esti akceptita apud la individueco de grandaj nacioj« kaj poste ke »malgraŭ tiuj kvantitaj diversoj la kultura individueco de konsciaj nacioj estas egalrajta.«

En sia »Nova Eŭropo« li definitive formulas sian opinion pri tiu problemo, dirante: »Malgranda nacio konscia kaj kulturo disvolviganta estas same egalrajte unuo kaj kultura individuo, kiel granda nacio«. En la kultura kaj historia evoluo de la homara malgrandaj nacioj de longe ludis kaj ludas ĉiam signifan taskon. Sufiĉas sole memori al si la decidan kulturen influon de malgranda antikva Grekujo je la granda Romano imperio; aŭ en Mezepoko la konatan kulturen floradon de ĉeĥa kaj flandra nacioj; fine en nia epoko eminentan kulturen signifon de malgrandaj nacioj kaj ŝtatoj, kiel ekz. la skandinaviaj landoj, Belgio, Svislando, Holando, Ĉeĥoslovakio, naria Finnlando, kies literatura, arta, politika, socia, industria kaj ekonomia evoluo kaj progreso sendube havas tutmondan gravecon, kulture influante ĉiufanke la homaran civilizon de la tuta terglobo.

Ke ekzistas ankaŭ tre diversa, ofte tre alte jam disvolvita kulturo denove renaskiĝintaj orienteŭropaj kaj antaŭ — aziaj nacioj, kiu ĉiufanke povas esti komparata kun okcidenteŭropa kulturo kaj kiu post la politika memstarigo de tiuj nacioj nur povos senmalhelpe disvolviĝi kaj certe tre sukcese elkreskos — pri tio malmultaj inter Eŭropanoj estas bone informitaj aŭ ĝenerale ion scias. Kiom el ili scias ekzemple pri tre malnova kaj alta kulturo de Armenio kaj Gruzio, pri novepoka nacia renaskiĝo de tiuj landoj? Kiu estas informita pri tre disvolvita socia popola kulturo de Estonoj, Letonoj kaj precipe Finnoj? Kiu antaŭ ne longe konis ĉarmajn kantojn kaj belegan popolan muzikon de Ukrainoj? Kiu aŭdis pri senmezura riĉeco, originaleco kaj beleco de popola poezio de tiuj novaj nacioj? Kiom da okcidentaj Eŭropanoj sciis la grandegan kulturen progreson de Ĉeĥoj en XIX jarcento tiun siaspecan miraklon de reviviĝo el morto de la tuta nacio?

Ni konsideru nun, ke ĉiu el tiuj novaj nacioj havas jam sian literaturon, gazetaron, propran muzikon, multajn diversfakajn asociojn, originalajn artojn k. t. p. —, unuvorte siaspecan kaj memstaran kulturen, tiam ni komprenos fine la kulturen kapablon kaj signifon de malgrandaj nacioj, ni komprenos per kio ili povas esti utilaj kaj necesaj por la tuthomara progreso, kiamaniere kaj kiadirekte ili certe influos kaj riĉigos la universan kulturen en proksima estonteco!

Estas ĉefa kaj necesa tasko de ĉiuj samideanoj el malgrandaj landoj kaj nacioj pere de esperanto konatigi al tuta mondo ilian kulturen vivon, evoluon, ĝisnunajn sukcesojn kaj venontajn perspektivojn. Tiudirekte la unua paŝo estas jam feliĉe farita per nia bulgara samideano Krestanov en lia belega verketo: »El proksima Oriento« kaj nun per fondo de tiu ĉi internacia tribunalo de malgrandaj nacioj, de gazeto »Nova Eŭropo«.

H. Boczkowski.

Pensoj de homarano.

Dediĉitaj al unua kunveno de malgrandaj nacioj de Rud. Fridrich.

1.

Kiu estas plej bona el nacioj? Ne ekzistas nacio kies nebonaj ecoj ne egalpesus ĝiajn virtutojn. Ĉiu nacio estas nur karikaturo de la homo. La pruvo ties estas, ke neniu nacio povas subpremi la alian, sed ĉiu devas lerni de alia . . . Mia vidpunkto estas filozofia, tio signifas senpartia kaj nepersonema. La sola tipo, kiu plaĉas al mi, estas perfekteco, homo kaj nenio plu, homo ideala. koncerne homon naciajn, mi toleras lin, mi okupiĝas pri li, sed ne admiras lin. Admiri mi povas nur la belajn individuojn de mia speco, grandajn homojn, geniojn noblajn karakterojn, animojn delikatajn kaj similaj uloj troviĝas sur ĉiuj bedoj etnografiaj. »Mia elektita patrujo« (kiel diris sinjorino de Staël) estas inter elektitaj personoj. Mi ne scias kial mia koro min puŝas pli al Francoj, Germanoj, Svisoj, Angloj, Poloj, Italoj ol al Brazilanoj aŭ al Ĉinoj. Ne ekzistas por mi trompado patriota, ŝovena, familia, profesia aŭ klasa. Tute kontraŭe, mi des pli delikate sentas la mankojn, malvirtojn kaj malperfektecojn de la grupo, al kiu mi apartenas. (Amiel.)

La nacioj de la tuta tero tremetas. Ĉie oni sentas ian streĉon de fortoj, kvazaŭ tertremo proksimiĝus. Neniam ankoraŭ homo havis tiom grandegan prirespondecon. Ĉiu momento alportas pli gravajn zorgojn. Ni konscias, ke estas okazonta io granda. Sed antaŭ la veno de Kristo la mondo ankaŭ atendis grandajn okazontajn kaj tamen ĝi ne akceptis Lin, kiam Li venis. Simile ankaŭ nune la mondo povas sentadi naskajn dolorojn antaŭ alveno de nova savonto kaj tamen ne kompreni lin.

En nuna tempo, kiam ĝenerale estas disvastigita la religia ekkono, ke la homoj estas fratoj, la vera scienco, ankaŭ la filologio, devas montri diversajn manierojn, kiel efektiviĝi tiun ekkonon. La tekniko unuigis la homaron per fervojoj. La aplikita lingvoscienco unuigis ĝin per esperanto. (Laŭ Lev Tolstoj.)

2.

Kiam oni demandis Sokraton, de kie li devenas, li respondis, ke li estas civitano de la tuta mondo; li konsideris sin kiel loĝanto kaj ĉi itano de la universo.

3.

Ĉiu nacio havas en la alia spegulon, en kiu ĝi povas bone observi iajn mankojn, malvirtojn kaj malbonajn ecojn; sed ĉe tio ĝi plej ofte kondutas kiel hundo, kiu bojas al spegulo pensante, ke ĝi ne vidas tie ĝin mem, sed alian hundon.

4.

La valoron de la esperantisto mi mezuras laŭ klopodo, per kiu li venis al nia ideo. Tial plej karaj al mi estas samideanoj el malgrandaj nacioj, kiuj perdinte iluzion pri la sufiĉanteco de potencaj lingvoj, aliĝis al ni; sed karaj samtempe la anoj de gvidantaj nacioj, homoj, kiuj propravole rezignas al reganta rolo de ilia lingvo gepatra.

5.

La tasko de ni, malgrandaj nacioj, estas ke ni esploru la problemon de raso kaj nacio kaj ke ni pruvu nian homaranecon tiamaniere, ke ni vivu laŭ nia eblo plej honeste. Tiam longe, kiam ni ne plenumos nian mision, ĉiuj avantaĝoj de grandaj nacioj estos al ni rifuzitaj.

Prof. dr. Arne Novák:

La aŭtoro de la kongresa teatraĵo.

Jaroslav Vrchlický.

El verko »Ĉeĥa literaturo laŭ birdperspektivo« tradukita de prof. jng. Vinc. Kroužil.

Poeto nepre renesanca estas Jaroslav Vrchlický. El la timema filo de neriĉa komercista familio, kruele persekutata de la sorto, el la melankolia edukito de la vilaĝa paroĥejo kaj de Praha universitato, el la sopirema lirikisto de la tradicia stilo, tri gravaj okazintaĵoj dum liaj junaj jaroj faris renesancan artiston, optimisme glorantan vivon kaj evoluon: restado en Italio,

feliĉa amo plena de volupta ĉarmo kaj studado de la francaj kaj italaĵoj poetoj. Jam en tiu tempo krom la nekredbla kreemeco poezia, kiu sekve de facileco kaj virtuozece fariĝis improviza rapidegeco, la juna poeto, posedanta miregan perceptecon kaj maloftan literaturan kulturen, malfermis sian senlaca tradukan aktivecon. Al ĝi la ĉeĥa literaturo dankas por interpretado de ĉiuj ĉefaj grandaj poeziaj verkoj francaj kaj italaĵoj de la tempo de la renesanco ĝis la nuna tempo; pli malfrue li tradukadis ankaŭ poeziajn verkojn germanajn. Ni ŝuldas al Vrchlický ankoraŭ pli pro tio, ke li per la tradukado de la plej komplikaj fremdaj formoj aldonis al la ĉeĥa stilo, precipe rilate la rimon kaj ritmon, neestintan formelegantecon. La originan produktadon de Vrchlický plejmulte influis Victor Hugo kaj lia kunularo — laŭ ilia spirito Vrchlický enmetis en la ĉeĥan poezion karakteron romanon, oratoran kaj samtempe kosmopolite reprezentan. De ili li transprenis la ideon pri la seninterrompa evoluo de la universo kaj de la homaro al la plej altaj formoj de la konscio; tiel manifestas sin Dio identiga kun la naturo, sed senlaca en la kreado kaj ŝanĝado. Por Vrchlický ne sufiĉis esti laŭdanto de la kosmaj fortoj, prezentantaj sin al ni foje kiel amo de virino, foje kiel geniececo de artisto, alfoje kiel antaŭsento de pensulo aŭ fondinto de religio; li sopiris kiel Victor Hugo esti poezia eĉ profeta historiisto de la kosmaj kaj universaj okazintaĵoj. Lia tuta poemverkado atingadis ciklan karakteron kiel la rondo de la »fragmentoj de epopeo«: meditado ĉirkaŭas la simbolajn scenojn el la fabeloj, legendoj, historio, sen limigo de la materialo: kelkaj fragmentoj aliĝas je la epopeoj, kelkaj je la tragedioj kaj komedioj, limo inter la epiko kaj medita liriko nenie estas fiksita; dike surmetataj koloroj kaj brua elemento oratora akcentigas la vidpunkton de la poeto, staranta super sia verko kun konscio de la deviga tasko.

Sed krom tiu ĉi paradema flugilo de medito kelkfoje Faust-alfoje Donjuanmaniera, sed plejofte moderne liberalisma kaj evolue optimisma, bruetas en verkado de Vrchlický dua flugilo pli: aera, pli intima, pli travivita: ĝi estas lia liriko. Post la interna resaniĝo de la poeto eksonas varma kaj forta melodio je la honoro de la maro kaj arbaroj, de la ama kaj familia feliĉo, de la penso kaj arto, aldonanta al la antikva kaj renesanca ĝojo pro la vivo akcenton plene modernan. Krom la kanto la lirikisto Vrchlický prilaboras la artajn, ja nepre artefaritajn formojn romanajn, treege konvenajn por la esprimado de la sanktigataj momentoj de la vivo, kiujn orumis la estetika kulturo; precipe en la soneto li atingis virtuozecon. Sed al la maturiĝanta viro-poeto la vivo ne alportis sole feliĉon, ĝuon kaj ludon; liaj amaj kaj edzecaj revoj pri feliĉo kruele katastrofis; la scio kaj arto liveris maldolĉajn fruktojn; en la soleco de la spirita laboristo kaj dum la meditado pri la morto montriĝis malgrava ĉio tingita eĉ atingota. La optimisto rezignis la vorton, la trolaŭdanto de la vivo ŝirvundis sin mem per la severa memsploro, la kultura ĝuemulo lernis la humilecon. Sed lia kantema fonto daŭrigis ja soni iom post iom per la pli pura melodio, senigita de la oratoraj almiksaĵoj kaj elementoj transprenitaj el la fremdlando. Ĝuste la lastaj lirikaĵoj de Vrchlický ravas per la ĉarmeco senta kaj esprima — la estinta lernanto de la antikvo kaj de la romana arto parolas el ili neniel plu al la sentoj, sed al la koro per tiu delikateco de amo kaj kun-sentado ĉirkaŭprenanta la tutan homaron, ja eĉ la tutan naturon, kiu ne neprave estis proklamata kiel signo de la slava naturo.

Jaroslav Vrchlický, kies verkoj plenigas rimarkinde ampleksan bibliotekon, kie krom la poezio kaj tradukoj de ĉiuj poeziaj specoj estas reprezentita eĉ la literaturo kritika, kaj kie kiel malgravan parton oni trovas ankaŭ la rakontan prozon, signifas pli ol nur unika fenomeno — ĝi estas tuta lireratura kulturo. Per li realiĝis la literatura programo de Jungmann, per li estis finpensita la devizo de Neruda pri la artista kosmopolitismo, sed per li ankaŭ estis plenumita la grava faro liberiganta, ĉar nur Vrchlický

Kongresanoj vizitu en Praha la kafejojn, restoraciojn kaj aĉetu en komercejoj, kiuj anoncas en nia esperanta gazeto!

nepre sendependigis la ĉefan poezion de la modeloj kaj tipoj de la poezio germana kaj kunigis ilin kun la eŭropa okcidento, precipe kun Francio. Ne estas miro, ke la personeco tiel riĉa je l' impulsoj instigis tutan aron da lernantoj kaj imitantoj, kiuj akiris la instruon de la samaj modeloj, sin esprimadis per la sama stilo, konkuradis kun la majstro en la samaj virtuoze uzataj formoj. Kelkaj el ili provis pacigi la artecon de Vrchlický kun burĝaj idealoj kaj dispecigis lian heredajon je simplanima priskribo de humoroj. Kelkaj poetoj-pastroj aplikis la renesancan parolmanieron de l'idolano Vrchlický por ĝin altiĝi al la lirika baroko je l'honoro de la Madono, eŭkaristio kaj Paska Vendredo. La aliaj alportis novan nuancon, transformante la sanan kaj sangoriĉan renesancan de Vrchlický en la arton rafinitan, nervan kaj ekmalŝanetan.

Antoni Grabowski.

Unu el plej malnovaj esperantistoj mortis en lastaj tagoj (4 julio) en Warszawa. Esperantisto, kun kiu Dro Zamenhof unuafoje parolis nun Esperanton, samideano, de kiu Dro Zamenhof ricevis unuan tradukon esperantan. Pola inĝeniero de kemio, mem sin okupinta pri internacia lingvo jam antaŭ esperanto. Grabowski tuj aliĝis al esperanto en 1887 (30 jara). Lerninte rusan lingvon li havis en sia lernolibro ekzercan tekston kiel rakonton Neĝa Blovado de Puŝkin. Prove, li ĝin tradukis en esperanton kaj sendis al Zamenhof. Li estas aŭtoro de jenaj verkoj: traduko de Goethe: La gefratoj (1889), Kondukanto internacia de interparolado (1890). La Nova Jaro de B. Prus kaj Janko Muzikanto de Sienkiewicz. Mazepa de Waŝniewski, Halka de Montuszko, opero ludita dum Oka kongreso en Kraków, Parnaso de Popoloj (poemoj el preskaŭ ĉiuj kulturaj lingvoj, Sinjoro Tadeo de Mickiewicz) ampleksa verko enhavanta preskaŭ 10.000 versojn. Grabowski estis membro de Esperantista Akademio, Prezidanto de Pola Esperanto-Asocio. La morto trafis lin subite sur la strato, dum li rigardis esperantaĵojn metitajn post la montra fenestro de Esperanto-Oficejo. Eri danka memoro ĝin konservos la tuta esperantistaro. *Hmd.*

Saluto de suferantaj Ukrainoj.

Ne estas facila tasko skribi nun pri Ukrainio kaj ukraina problemoj; ankoraŭ pli malfacile — pri nuna malfeliĉa sorto kaj vivo de ukraina popolo.

Ukraina nacio estis liberigita dum la tutmonda milito kaj post la rusa revolucio; en Aŭstrio ĝi estis liberigita post rompiĝo de nigraflava monarkio, kie en Orienta Galicio stariĝis — Okcidenta ukraina respubliko.

Bedaŭrinde tiuj ambaŭ ukrainaj ŝtatoj baldaŭ estis okupitaj per malamikaj fortoj kaj ĝis nun suferas sub fremda jugo tiamaniere, ke Ukrainoj en propra patrujo sentiĝas kiel fremduloj.

Benita ukraina lando, riĉa kaj fruktodona ukraina tero jam de kvar jaroj estas ruinigata per senĉesa milito kaj ribelo. Centmiloj da ukraina loĝantaro pereis pro epidemiaj malsanoj, pro terura malsato — precipe en grandaj urboj; ankoraŭ plimulte suferas tiurilate virinoj kaj infanoj! Aliaj centmiloj da ukrainoj estis elpelitaj el sia patrujo kaj devigitaj serĉi rifuĝon en fremdaj landoj. Multe da ukrainaj militkaptitoj estas internitaj ankoraŭ en diversaj landoj. Estas tre interese, ke ĝuste inter tiuj malfeliĉuloj, kiuj plej parte tre mizere ekzistas, preskaŭ malsatante — troviĝas multe da fanatikaj kaj fervoraj esperantistoj, kiuj sankte kredas je esperanta movado, kiuj skribas al ni kortuŝantajn leterojn, petante informi ilin pri la nuna situacio de esperanta afero, pri ĝia progreso kaj sukceso post la milito. En tendaroj de ukrainaj militkaptitoj estas organizitaj esperantaj rondetoj, kie oni propagas nian aferon kaj antaŭ ĉio instruas praktike kaj teorie esperanton. Ĉion tion oni faras plej multe sen esperantaj lernolibroj, ĵurnaloj aŭ niaj publikajoj ĝenerale. De ĉiuj lokoj niaj ukrainaj samideanoj petas sendi al ili esperantaj verkojn kaj precipe gazetojn, tre interesante sin, kompreneble, pri nia XIIIa kongreso en Praha. Bedaŭrinde neniu el ili povas persone

ĝin ĉeesti ne sole pro ilia financa mizero, sed ĉefe pro manko de persona libero. Tial ili tiamaniere salutas XIIIan kongreson, dezirante plenan sukceson al ĝi, kaj al niaj ĉeĥoslovakaj kaj ĉiuj samideanoj ĝenerale. Ili esperas firme, ke en ne tro malproksima estonteco unu el venontaj esperantistaj internaciaj kongresoj estos aranĝita en tute liberigita Ukrainio, en ĝia malnova ĉefurbo — Kiev. *H. Bĉ.*

La misio de la ĉeĥoslovaka nacio.

Ĉiu nacio simile kiel ĉiu homo havas sian propran mision, per kiu ĝi devas plenumi sian taskon sur la mondo. La misio de la nacio, pri kiu ĉiuj pensis, ke ĝi jam de longe estas mortinta, devas esti speciale grava, ĉar la mortintoj ne revekiĝas, se ili ne havas ion por fari en la mondo.

La tasko de la ĉeĥoslovaka nacio estas vidata plej bone en ĝia historio. Masaryk pruvis, ke la senco de nia historio estas esprimita per la Reformacio. Nia granda magistro Jan Hus deklaris sian plej grandan ideon per la tezo:

»Tial, kara kristano, serĉu veron, aŭdu veron, lernu veron, amu veron, diru veron, tenu veron, defendu veron ĝis la morto!«

Li kuraĝis en tiu tempo de aŭtoritato, de malliberigo de sento, de eklezia tiraneco, centon da jaroj antaŭ Luther, postuli sanan intelekton kaj sperton kontraŭ la aŭtoritato de la ekleziaj dogmoj. Per tiu ĉi faro Hus stariĝis en vicon de batalantoj por la demokratiĝo de la homa intelekto.

Per tio la militoj husanaj estis militoj por demokrateco de la religio. Ili ne estis gvidataj de princoj kaj de reĝoj, sed de la tuta nacio. Romo, kiu estis reprezentanto de aŭtoritato, kaj kiu diris ke ĝi estas reprezentanto de Dio, trovis en tiu ĉi nacio de Hus la plej fervoran antagoniston, reprezentantan la popolon, kiu fariĝis en la nova tempo la vera reprezentanto de la dia volo.

Nia devizo en la estonta tempo devas esti la sama, kia ĝi estis en la tempo estinta. Demokrateco de la homa intelekto, de la homa volo. Ni ĉiuj estas gefratoj kaj neniu devas premeigi la alian. Tiu ĉi tasko estas la sama, kiun havas ankaŭ la esperantistoj.

»Per la inter-kompreniĝo al homara frateco kaj al la regado de popolo, kio estas celo de la vera demokrateco.«

Per tio la ĉeĥoslovaka nacio estas kapabla en la unua loko kompreni la noblan celon de la lingvo internacia kaj helpi fervore je la plenumo de sia tuthomara tasko.

D-ro Alex. Sommer-Batěk.

La nuna komerca situacio de la Estona respubliko.

La komercistoj ĉi tiuj jaroj perdas grandajn sumojn, ĉar la prezoj senĉese malaltiĝas. Bedaŭrinde pro la granda limimpasto la eksterlandaj objektoj: fruktoj, tabako, sukero k. a. estas tro multekostaj. Komerca vivo estas tre malforta. La ŝuoj, vestaĵoj kaj diversaj maŝinoj kostas en Estonio duoble tiom, kiom ekzemple en Finnlando kaj Germanio. Sed tamen oni povas diri, ke la Estonoj entute tamen pli bone vivas ol en la pasinta jaro.

Oni esperas, ke baldaŭ estos jam fondita Komerca Ĉambro en ĉefurbo Tallinn, la unua K. Ĉ. en Estonio. Antaŭ ne fonge estis starigita en Tallin reprezentado de agronomiaj maŝinoj de la ĉeĥoslovakaj fabrikoj. *Vadim Anofrijev.*

El la statistiko pri Ĉeĥoslovakio.

La tuta respubliko havas areon 140.483 km² kaj 13.595.316 loĝantojn en 12.653 komunantoj (15. 2. 1921). El tio apartenas al:

Bohemio	52.052 km ² , 6.664.932 loĝ.;
Moravio	22.304 km ² , 2.660.737 loĝ.;
Silezio	4.419 km ² , 670.937 loĝ.;
Slovakio	49.014 km ² , 2.993.479 loĝ.;
SK. Rusio	12.694 km ² , 605.773 loĝ.

Laŭ nombro da loĝantoj la ĉefaj urboj havas (15. II. 1921):

Praha (Bohemio)	676.476
Brno (Moravio)	221.422
Opava (Norda Silezio)	33.427
Ĉ. Těšín (Suda Silezio)	8.041
Bratislava (Okc. Slovakio)	93.329
Košice (Orienta Slovakio)	52.699
Užhorod (Subkarpata Rusio)	20.213

En la tuta respubliko estas 3.121.430 loĝejoj en 1.933.776 domoj; en 100 domoj estas 161 loĝejoj kun 703 loĝantoj; en 100 loĝejoj estas 436 loĝantoj.

La malpliigo rilate la jaron 1910 estas 871 personoj. Sur 1 km² estas 97 personoj.

Du mil malgrandaj esperantistoj.

En 25 komunumaj lernejoj de Milano (Italio) oni instruis ĉirkaŭ du mil knabojn kaj knabinojn pri esperanto. Ĉirkaŭ 1800 el ili faris ekzamenon kun bona sukceso antaŭ ekzamenantaj docentoj: prof. Carbone, dro Lupi kaj dro Monti. Granda subtenanto de tiu ĉi instruado pri esperanto estis urbestro de Milano dro A. Filippetti, kiu partoprenos ankaŭ la kongreson en Praha. *Bh.*

Internaciaj foiroj.

La tria foiro en Praha okazos de la 1a ĝis la 8a de septembro 1921a. Pri ĝi ni informas en speciala artikolo.

La dua foiro en Liberec (Reichenberg) okazos de la 13a ĝis la 21a de aŭgusto 1921a. En 17 foiraj konstruaĵoj 3000 ekspoziciantoj montros specimenojn, de fabrikoj de 20 diversaj komercaj branĉoj. Vizitontoj ricevos 50% rabaton por veturbiletoj, por vizoj sur paspartoj ktp. La oficejo (Messamt, Liberec, Ĉeĥoslovakio) uzas esperanton.

La unua foiro en Ljubljana (Jugoslavio) okazos de 13 ĝis 24 de aŭgusto 1921.

La kvina foiro en Frankfurt okazos de la 25a de septembro ĝis la 1a de oktobro 1921a. Pri ĝi ni publikigos detalajn informojn venonte.

Orienta foiro en Bratislava (Pressburg, Poszony, Slovakio) okazos inter 6. VIII.—15. VIII. 1921.

La tria foiro de Skanio en Malmoe (Svedio) okazos inter kaj 7 de aŭgusto 1921. Foira oficejo (Kaleudegam 5, Malmoe, Svedio) korespondas esperante. *J. A.*

Leteroj por „Ĉ. G.“ kaj „N. E.“ por

s-roj Oldřich Adámek, Jiří Adámek, H. Bouška, Rudolf Hromada, prof. D^{ro} St. Kamaryt estas enmetotaj en speciala leterkasto de »Ĉeĥoslovaka Gazeto« en stando de s-ro Vlach en kongresejo.

Ĉie estas ricevebla

FRAENKELLIQUEURS

de neatingebla kvalito!

